


Menuro
(Aŭstralia birdo)



Esperanto sub la Suda Kruco

Marto-Aprilo 2003
Numero 62 (vol. 11, no. 2)



ISSN 1039-9380

Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj
Numero 62 (volumo 11, numero 2, Marto-Aprilo 2003)

Redaktoro: Donald Broadribb

PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio

☎: (08) 9641 1937

Faksoj: (08) 9641 1134

E-poŝto: sudakruco@sudakruco.org

Libroservo

Libroservo de AEA, Esperanto-Domo,
143 Lawson St, Redfern, NSW 2016,
Aŭstralio. E-poŝte:

libroservo@ans.com.au

Korespondaj kursoj

Hazel Green, 44 Towomba Road,
Oakey Qld 4401, Aŭstralio. E-poŝte:

hazgreen@twmba.net

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO, VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *Esperanto sub la Suda Kruco*: “Ni vere bezonas artikolon pri ...?” Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakonton, esprimon de vidpunkto, leteron, desegnaĵon, foton. Ni preferas ke vi sendu vian kontribuon per e-poŝto, al la adreso sudakruco@sudakruco.org; vi povas ankaŭ sendi ĝin sur Zip-disko (100mb aŭ 250mb), sur komputila disko (Mac aŭ Windows), sur KD, aŭ sur papero. Se vi sendas sur papero, la teksto devas esti klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flankon de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitaĵajn manuskriptojn ni ne akceptas.

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro.

La kovrilbildo: La menuro troviĝas en orienta Aŭstralio, en malseketaj arbaroj. Ĝia liroforma vosto donis al ĝi la kromnomon “lirovostulo”.

EN ĈI TIU NUMERO

Artikoloj:

La geedziĝa donaco (novelo de Ronald Gates).....	3
Via redaktoro pardonpetas.....	4
19a aŭstralia somerkursaro	5
raportas Terry Manley.....	5
raporto el <i>Tamen Plu</i>	6
raportas Franciska Toubale	8
Diversaĵoj	10
Estraro 2003 de AEA, Adresaro	10
Sukcesis en ekzamenoj, La oceania komisiono	
Ekspozicio de infanaj desegnoj,.....	11
Esperanta revuo en Irano.	
Informado (la Sekretarop de AEA)	12
Raporto de la redaktoro, noto pri la recenzo de NPIV, danko de Jenny Bishop	
National Language Conference.....	13
Monda Turismo bankrotis, Nova filmo	
Interrete	14
Nekrologo: William Harding	14
Dezirata korespondi	15
Mesaĝo de Jenny Bishop	16
Milita floro miksa...(Debra McCarney)....	17
La magoagotago	18
Por ridigi vin (<i>MisPiv</i>).....	23
La libroservo ofertata	24
Treasurer’s/Auditors report.....	26

Recenzoj:

Naskiĝo de la rustimuna ŝtalrato

For the Beginner:

The Internet and Esperanto	19
Adjectives	20
The Ethical Side of Esp. (Kep Enderby).21	

ESK estas legebla per Interreto:

<http://www.esperanto.org.au/esk>

Limdato por artikoloj por la maja numero: 15 aprilo.

La geedziĝa donaco

Novelo, de Ronald Gates

“Ĉu ni nepre devas iri?”

La demandon Henriko faris la trian fojon, kvankam kun malpliiginta forto. Kaj esence ripetigis ankaŭ la respondo de Marta. “Kompreneble! Ĉu ni povus ne ĉeesti la edziniĝon de la ununura infano de mia plej kara amikino? Monika neniam pardonus min.”

Henriko, mallevante sian matenmanĝan kafotasegon, rezignis. “Ho, bone!”

“Do, konsentite! Nun ni ekfaru la aranĝojn! Mi opinias, ke tri noktoj sufiĉos, de la vendredo ĝis la lundo. Tio permesos al mi pasigi la dimanĉon kun Monika. Do telefonu vi al tiu hotelo, en kiu ni loĝis dum la vizito al la ĉefurbo antaŭlastan Paskon.”

“Ĉu ni veturigu nin per la aŭto?”

“Prefere ni iru aviadile. Mi lasos al vi rezervi sidlokojn. Dume mi esploros pri taŭga geedziĝa donaco. Kaj” — ŝi rigardis lin el okulangulo — “mi devos ankaŭ aĉeti novan robon.”

Henriko antaŭe ne pensis pri vestoj. “Mi ne povos surmeti la smokingon. Kelkaj jaroj jam pasis, de post kiam mi lastafoje havis okazon uzi ĝin, kaj eĉ tiam la pantolono iĝantis tro strikta je la talio. Ĉu vi opinias, ke konvenos porti ordinaran kompletan?”

“Mm! Eble. Certe regas nuntempe malpli da formaleco, ol en nia juneco. Kaj ne valorus la elspezon aĉeti novan smokingon por nur unu okazo.”

Marta malfermis rozkoloran kartonan skatolon kaj tiris supren kreaĵon el diafana ŝtofo paŝtele blua. “Jen la nova robo! Belega, ĉu ne?”

Henriko rigardis. Kion li diru? “Placâ koloro! Ĉu vi nun surmetos ĝin, por

ke mi vidu?”

“Certe ne! Vi devos atendi ĝis la geedziĝa tago.”

Li ne protestis. Li ŝanĝis la temon. “Ĉu vi trovis ankaŭ donacon por la feliĉa duopo?”

“Mi ankoraŭ ne serĉis. Mi devas konfesi, ke ĝis nun mi eĉ ne pripensis, kia donaco plej taŭgos. Mi esperis, ke vi havos utilajn ideojn.”

Lia brovo sulkiĝis. “Ideojn? Hm! Mi pensu! Kiajn donacojn oni kutimas ricevi en tia okazo? Eble fajencaĵojn, aŭ pokalojn, aŭ tolaĵojn, aŭ domajn aparatojn, aŭ eĉ klingovarojn? Vi konas la junan Klaŭdian pli bone ol mi. Elektu vi el tiu listo!”

Marta malakceptis la proponitan elekton per forviŝa gesto. “Ne! De tiaj bezonoj ili ricevos pli ol sufiĉe. Ambaŭ familioj estas ege multhavaj. Tiu de la fianĉo amasigis riĉaĵon per importado de artaĵoj, kaj laŭ Monika la junulo mem, kiu estas sola filo, ĝuas prosperan perspektivon kiel la estonta kompaniestro. Ne! Mi volas donaci ion nekutiman, frapantan ... ion, kio daŭre memorigos la ricevontojn pri ni.”

Henriko serĉis en sia menso, sed vane. “Lasu min pripensi la aferon! Eble inspiro venos.”

“Skulptaĵon!”

Marta levis scivolan vizaĝon de sur sia magazino. “Kion?”

Ili ĵus finis la vespermanĝon kaj sidis en la salono. “Skulptaĵon, mi diris. Hodiaŭ, en la montrofenestro de tiu nova kuriozaĵa butikio, mi vidis tutan kolekton da skulptaĵoj. El alabastro, mi pensas. Estas diversaj bestoj, kaj pluraj nudaj figuroj viraj kaj virinaj.

Ĉilastaj estas vere frapantaj.”

Marta entuziasmis. “Bonega ideo! Ni iru tien morgaŭ matene!”

Henriko kaj Marta sidis en la pasaĝera atendejo. La taksion al la flughaveno ili mendis por horo tiel frua, ke ili nun devis atendi pli ol kvardek minutojn, antaŭ ol oni anoncos la enaviadiliĝon. Henriko tenis surgenue pezan pakon longan je pli ol kvindek centimetroj, kovritan per bunta, precipe ruĝa, papero fiksita per rozkolora rubando. Ĝin li rifuzis cedi kun la valizoj, klarigante, ke ĝi estas rompiĝema. Li rigardis antaŭen, nemon dirante. Marta foliumis en ilustrita magazino.

Fine venis la alvoko. Henriko pene ekstaris kaj zorge ekpaŝis. Marta sekvis lin, de tempo al tempo tuŝante lin je ŝultro kaj dirante, “Atentu!”

En la aviadilo Marta sidis apud fenestro, kaj Johano apud la trairejo kun la pako refoje sur la genuoj. Pro ĝi li devis rifuzi la de la stevardino proponitajn kafon kaj manĝeton.

Surteriĝinte, ili prenis taksion al la hotelo, kaj en la ĉambro Henriko finfine povis senŝarĝigi sin. La pakon li starigis en la pendiga parto de la vestoŝranko.

Marta telefonis al Monika por anonci ilian alvenon. “Ni kunportis la gedziĝan donacon,” ŝi aldonis. “Mi supozas, ke tiaĵojn oni elmontras en la akceptejo, por admiro post la ceremonio. Ĉu mi povos lasi nian pakon tie morgaŭ matene, antaŭ ol iri al la preĝejo?”

La respondo kompreneble estis, ke jes. Ili ĝisumis, kaj Marta kaj Henriko iris vespermanĝi.

En la akceptejo tri longaj tabloj

flekxiĝis sub la pezo de vicoj da diversformaj pakoj ankoraŭ ne malvolvitaj. Henriko kaj Marta aldonis sian, kaj ili piediris al la preĝejo.

Tiu ejo estis jam homplena, kaj ili apenaŭ, post maltrankvila serĉo, trovis sidlokon en la novedzina flanko.

La edziĝonto, Paŭlo, atendis antaŭ la altaro. Orgeno ekludiĝis, kaj Klaŭdia kaj ŝia patro aperis en la ĉefpordo kaj komencis malrapidan paŝadon antaŭen.

Post la ceremonio kaj la ekstera sinsekvo de gratuloj, fotografado kaj konfetoĵetado, estis duonhora intertempo, antaŭ ol la gastoj kolektiĝis en la akceptejo. Iu jam forprenis la volvaĵon de ĉirkaŭ la donacoj, kaj jen sur unu el la longaj tabloj staris la nuda virina figuro, kiun Marta elektis en vizito al la kuriozaĵa butikio.

Ŝi prenis Henrikon je brako kaj tiris lin en tiu direkto. “Vere frapanta, ĉu ne?” ŝi diris.

Henriko ĵus malfermis la buŝon por respondi, kiam nekonato, kiu staris apude, intervenis. “Sufiĉe belforma, se tiaĵojn vi ŝatas. Sed mi tute ne komprenas, kial iu elektis ĝin kiel donacon al Klaŭdia kaj Paŭlo. Tiujn skulptaĵojn el alabastro lia kompanio importas el Italujo pogrande.” □

PARDONPETO

En *ENK* 61 (januaro-februaro 2003) la familia nomo de Brian Currie, mortinta en oktobro, estis multfoje misliterumita “Curry”. La redakcio elkore pardonpetas pro tiu eraro.

19-a Aŭstralia somerkursaro de Esperanto

Raportas Terry Manley

Estis mia dua somerkursaro en Melburno. En 2001 mi alvenis kun mia familio, kaj mia edzino Helen studis dum mi kaj filino Elissa esploris la urbegon. Ĉifoje ili ne alvenis kun mi. Mi refoje restis ĉe la domo de la familio Lutz, tiu gastama, afabla Esperantista familio en Melburno. Carol, la patrino, estas bona Esperantistino, kaj ankaŭ la filino Miranda. Andrew, filo de Carol, kaj Luke, nepo, partoprenis en la komenca kaj infana kursoj ĉijare. Do iom post iom la tuta familio Eperantistiĝos.

La infana kurso, gvidate de Penny Vos (gajninto de la Medaliono Torr) estis unu el la plej ĝuigaj aferoj de la kursaro. Vidi tiom da infanoj kaj dekelkjaruloj vagantaj en la manĝejo kaj ĉirkaŭe inter ni pli aĝaj Esperantistoj, estis ja feliĉa afero. Estis sep infanoj en la kurso de Penny. Sed ankaŭ ĉeestis Karina Turvey plus filinoj de Penny: Heidi kaj Amy, plus la junulo Jonathan el Novkastelo. Feineto Karina kaptis la korojn de multaj per ekrigardeto. Mi gratulegas la organizintojn kaj instruiston Penny pro tio. Se tio estus okazinta antaŭ du jaroj, estus nenia bezono ke mi distru mian filinon, ĉar ja estus distraĵoj infanaj en Esperantio.

En la komenca kurso instruis kaj Franciska Toubale kaj Vladka Chvatalova el Ĉeĥio. Kvankam Vladka jam laboris pri la AEA libroservo en Sidnejo dum monatoj, estis mia unua renkontiĝo kun ŝi. Kaj klare kaj altkvalite ŝi parolas kaj instruas! Kiel lingvoinstruisto, lernanto de la angla,

eksekretario de TEJO, kaj prizorganto de infanoj en Sidnejo, ŝi estas granda gajno por ni — kvankam nur ĝis Majo.

Kaj kion diri pri Franciska? Kia virino! Krom instrui ege bone al la unua kaj dua niveloj, ŝi aktorin (kia rolo kiel posedanto de pulo ĉe bestkuracejo!) kaj ŝi kantis bele dum la kabareto.

Por la dua nivelo ankaŭ Gràzina Opulskiene el Litovio instruis. Ĝis nun por la plej multaj el ni nekonata instruisto, Gràzina certe impresis nin per vigla instrumaniero kaj la memevidentia ĝuo kiun ŝi montris pro ŝanco instrui en, por ŝi, ĉi tiu “ekzotika” lando. Mi partoprenis en la tria-nivela kurso de Grazina kaj lernis pri ŝia lando, Litovio, kaj ĝuis la etoson de amikeca rondo de ĉirkaŭ 12 Esperantistoj.

Mia alia instruisto por la tria nivelo estis Atilio Orellana. Kaj kia bona sperto partopreni en tiu kurso! Alveninte al la kurso, ĉiu el la grupo ricevis kromnomon kaj kromkarakteron por la tuta kurso. Do mi iĝis Petro Lorenz, fama aktoro el Usono, nun loĝanta en Ĉikago kun mia edzino Ĉarlota. Ĉarlota estis prizorgisto de hundoj kaj ankaŭ partoprenis en la kurso! Inter la aliaj estis fama operokantisto, redaktistino, ĥirurgo, numismato kaj multaj aliaj interesaj homoj. Nekredeble por Esperantista kurso! Tiel Atilio kreis scenejojn kaj teatraĵetojn per kiuj ni lernis vortojn, gramatikon — konversacii ... Lerte farite. Sed per Esperanto ni ne nur lernis pri Esperanto sed eĉ kiel lerni. Atilio kondukis nin al

rimedoj psikologiaj por lerni: Legado tuj antaŭ endormiĝo; medite kuŝante dum aŭskultado de Esperanto; kaj ekzercoj fizikaj por aktivigi kaj la kreeman kaj la logikan “flankojn” de la cerbo. — pri ĉi tia sperto li esplorigis nin.

Krom Atililo, Marcel instruis al la tria-niveluloj kaj la kvara-niveluloj. Marcel cerbumigis nin kiel enkonduki Esperanton al nova lernantaro, kaj kiel trakti gramatikan punkton antaŭ klaso de Esperantistoj. Do li pretigis nin por instrui kaj tiel instruis al ni. Krom instrui al tiuj, Marcel gvidis grupon por prepari sin por la AEA-ekzamenoj. Marcel iom teruris nin ne nur per gramatiko sed ankaŭ dum la prezentado de la teatraĵoj. Kiel buĉisto — ho pardonu — bestkuracisto kovrita per sango. Ege humura peco de la Viktoria grupo.

Dum la kursaro estis ankaŭ post-

tagmez-elektaĵoj. Suzanne Holton gvidis grupon por kanti, Sandor Hovarth por ludi kaj Daniel Kane por kreeme verki. Kvankam la Viktoria teatraĵo estis ege humura, ĝi ne gajnis premion en la konkurso. La nivelo de la prezentaĵoj estis tiel alta! La kvinslanda grupo venkis. Kun aliaj bonaj pecoj el Okcidenta Aŭstralio kaj Suda Aŭstralio. Kaj kia granda ĝuo, surprizo — ĉu ŝoko? — kiam ni NSK-uloj gajnis la ŝildon en la kantado. Kontraŭ kvar aliaj indaj konkursantoj el Nov-Zelando, Kvinslando, Suda Aŭstralio kaj Viktorio, ni sukcesis ridigi kaj aplaŭdigi la aŭskultantaron kaj gajnis! Kaj ĉiu alia tiel belmuzika. Por ni Jonathan Moylan violonis, komponis kaj verkis, Matthew Maguire gitaris kaj kantis, kaj Joy Turvey, Penny Vos kaj Terry Manley kantis.

Vere plenaj du semajnoj da lernado, babilado, distrado — alte rekomendinda.

[el *Telopeo*]

Pri la 19-a Esperanto-somerkursaro

el *Tamen Plu*

La evento okazis en belega Melburno de la 5-a ĝis la 17-a de januaro.

Vladka Chvatalova montris treege belegajn lumbildojn pri Prago, belega urbo meze en Eŭropo kaj ĉefurbo de belega Ĉeĥujo.

Marcel Leereveld montris belegajn lumbildojn pri Ranguno en Birmo. Estas en Ranguno multaj budhistaj temploj, pri kiuj li interese parolis.

La alia grava moŝto, Kam Lee, kiel kutime ĉirkaŭiris fotografante ĉion kaj ĉiujn. Li faris la komunajn fotografadojn per kiuj li plenigis 4 aŭ 5 tablojn en la komuna manĝejo.

Iun vendredan vesperon Pamela

kondukis nin ĉiujn per tramo al la urbocentro de Melburno. De tie ni promenis al la suda bordo de la rivero Jarao. Ni vidis la butikumejon Meyer, la Reĝan Arkadon kun la du gigantoj el Korano: Gog kaj Magog, la Artocentron kun i.a. multaj teatroj, kaj ni eĉ manĝigis kelkajn didelfojn en unu el la multaj tieaj parkoj. La didelfoj venis el la arboj kiam malheliĝis.

Iun tagon ni iris per aŭtobuso al Balarato, ormina urbo okcidente de Melburno. Ni restis tie la tutan tagon, ĉar estis tie multo vidinda. Ekz. kiel oni vivis en Balarato en la jaro 1854. Ni vidis du lernejojn kaj du preĝejojn.



Ni lernis kiel trovi oron en la akvo, kaj ankaŭ — sed ne plej malgrave — kiel fari bombonojn. Estas

multaj vendejoj kaj restoracioj tie, kaj ĉio estis tre interesa, kaj multekosta.

Iuj gesamideanoj ne volis vidi la orminan parton de la urbo. Ili preferis vidi la urbon, kie loĝas la hodiaŭaj enloĝantoj. Ili raportis, ke ankaŭ tiu parto estas tre vidinda. Survoje hejmen ni haltis ie por aĉeti freŝajn pomojn, ĉar la regiono famas pro siaj bongustaj pomoj.



Alian tagon ni iris per malgranda pramo al urbeto Vilhelmurbo sude de Melburno. Estis


tre bele tie, sed varmege. Persone mi pasigis la plej grandan parton de la tempo sidante en restoracio manĝante glaciaĵon. Sed ne nur tio. Mi estis fotografita kune kun aliaj 8 gesamideanoj. Ni formis la vorton “Esperanto” laŭ la malnova semafora alfabeto, kiun parkere memoris Ken Rolls.

Okazis ankaŭ “Spirita Kunveno” iun matenon. Fakte Dimanĉon. Ĉeestis kristanoj — anoj de la Pentekosta movado kaj katolikoj —, bahaanoj, kaj nekredantoj. Post prezentado de la diversaj malsamaj homoj kaj kredoj, ek-estis diskuto pri tio, kion faros precipe la kristanoj, kiam la 3-a mondmilito komenciĝos. Interese estis, ke nek la kristanoj nek la nekredantoj respondis al tiu grava demando, nur la bahaanoj diris ion, sed nur ke plej grave estas, ke ni amu unu la alian. Tion ni jam scii, ĉu ne?

Okazis ankaŭ la tradicia “Sapskatolo” dum kiu oni aerumas sian personan opinion pri multaj malsamaj aferoj. Tio estis amuza, sed la vespero estis iom tro malvarma por sidi ekstere tiom longe.

Okazis kompreneble la ekzamenoj, sed tio ne daŭris longe, ĉar nur tri kandidatoj interesiĝis.

Io alia, kio estis eksterordinare amuza, estis la teatraĵkonkurso, kiel ankaŭ la kantokonkurso. Venkis en la teatraĵa konkurso Kvinslando, kaj Nova Suda Kimrujo venkis en la muzikaj kanto-konkurso, verŝajne pro la unuafoja ĉeesto de la multtalenta 14-jarulo Jonatano el Novkastelo, kiu ludis bele la violonon!



La lastan vesperon okazis la plej bonega, la festeno. Ni manĝegis ĉe tabloj kun tablotukoj kaj

kun po 3 kandeloj en arĝentaj kandelingoĵ sur ĉiu tablo. Dum ni manĝis estis disdonataj atestiloj al ĉiuj, ne nur al la ekzamenitoj, sed ankaŭ al ĉiuj aliaj, kiuj prenis parton en la lernado. Same la geinstruistoj ricevis donacaĵojn, kaj Moŝto Kam daŭrigis sian fotografadon de ĉio.

La humoro de ĉiuj estis eĉ tre bonega, kaj mi povas senriske diri, ke tiu ĉi estis la plej bona Somerkursaro ĝis nun.

Ho, mi preskaŭ forgesis, plej grave estas, ke okazis ŝanĝoj al la estraro de A.E.A.

Restas do nur gratuli la novan estraron, dezirante al ĝi multan sukceson en la laboro progresigi Esperanton en Aŭstralio, kaj danki la malnovan pro laboro bone, eĉ bonege, farita! □

La 19a Aŭstralia somerlernejo de Esperanto

Raportas Franciska Toubale

Tiu somerlernejo restos en mia memoro kiel gaja kaj kreema evento. Tion povas atesti la “Novajo”, kiun Terry Manley konsciencie aperigis ĉiun duan tagon kaj al kiu ne mankis kontribuantoj.

Ĉu kaŭzis tiun apartan etoson la instigo al kremo de la tri instruistoj de la tria nivelo?

Mi supozas ke kiam oni ricevas novan identecon por du semajnoj, kiel la ler-

nantoj de la klaso de Atilio, pli facilas permesi al si agi nekutime kaj iom revivi. Ĉu ĝi estis la sekvo de la ludoj de Sandor, kiuj, kvankam lernigaj rilate la lingvon, postulas grandan fantazion

kaj ankaŭ fizikan kaj mensan malstreĉiĝojn?

Ĉiukaze estis agrable vidi la rideton kaj kontenton de la ĉeestantoj.


Kelkaj homoj, kutime trankvilaj kaj diskretaj,



Sur la sapskatolo: Ken Rolls



Sur la sapskatolo: Jonathan Moylan



Sur la sapskatolo: Bernie Heinze

aŭdacis trovi la petolemon de juneco. Tiu sperto certe ŝanĝis ilian sintenon kaj de nun ili montrus pli da vicleco, dank' al Esperanto.

La sapskatolo, kiu kutime daŭras kvardek/kvardek-kvin minutojn, daŭris pli ol horon, malgraŭ la malvarmeo de la vento, kiu tiam blovis en la ĝardeno de Internacia Domo. Rapide la ĉeestantoj ne plu provis pervorte refari la mondon, sed intersanĝis ŝercojn, akompanatajn de fortaj ekridoj.

La juĝistoj penis kaj longe debatis por atribui la trofeojn Herbert Koppel kaj Fritz Mueller Soraŭ: ĉiu ŝtato prezentis valoran kontribuon, ĉu por la drama, ĉu por la muzika konkurso, donacante al la publiko varian distran vesperon. Ni ne forgesos la ĝojan kabareton, iniciaton de la kvinslandanoj, aparte de Gay Philips, kiu tradukis la kantojn.

La ok komencantoj, kiuj ne povis ĝui la distrajn erojn de la somerkursaro pro la tria studperiodo en la posttagmezo, kaj pro tio ke ili reiris al sia hejmo ĉiun vesperon, fariĝis gaja, vigla grupo. La aĝonivelo ne estis tiom alta kiel kutime, kaj la entuziasmo estis tre granda.

Almenaŭ tri virinoj, Kioko kaj Hiroko, japandevenaj, kaj Pip, kiu studis interalie la japanan lingvon, trovis Esperanton sufiĉe facila kaj devigis sin ne krokodili ne nur dum la kurso, sed ankaŭ dum la tagmanĝo kaj la trajnvojaĝo. Mi esperas ke ili ĉiuj sukcesos iamaniere finlerni la lingvon, aparte Marianne, kiun la organizo Indiĝenaj Dialogoj forte allogas pro ŝia rolo en aborigena komunumo.

Mi senpacience atendas la okazon renkonti ilin estonte en esperantaranĝoj.

Dankon al ĉiuj ĉeestantoj, kies ĝojo faris la laboron de instruisto kia mi malpeza. □



POR RIDIGI VIN



Decidis Joĉjo skiadi kun sia amiko, Bob. Kune ili plenigis la aŭton de Joĉjo per superfluaĵoj, kaj iris norden. Nur kelkajn horojn poste ekblovegis fortega ventego. Ili haltis ĉe bona domo kaj petis la belulinon, kiu malfermis la pordon, ĉu eble ili povos pasigi la nokton tie.

“Mi bone komprenas”, diris la virino, “ke la vetero estas multe pli ol ordinare aĉa, kaj ke mi havas tiun ĉi grandegan domegon, sed antaŭ nelonge mortis mia edzo, kaj mi timas, ke miaj najbaroj klaĉos, se mi permesos, ke vi dormu ĉi tie.”

“Ne timu,” diris Joĉjo, “ni volonte dormos en la fojnejo, kaj se la vetero pliboniĝos, ni foriros antaŭ ol la suno ellitiĝos.”

Konsentis la sinjorino, kaj la du viroj eniris la fojnejon, kaj ekdormis.

En la mateno la vetero estis multe pli bona. Ili foriris kaj ĝuis skiadon la tutan semajnfino.

Proksimume naŭ monatojn poste Joĉjo ricevis neatenditan leteron de iu advokato. Daŭris kelkaj minutoj antaŭ ol li komprenis, ke la letero estas de la advokato de la alloga sinjorino, kiun li renkontis dum la skisemajnfino kun Bob.

Li vizitis sian amikon, Bob, kaj demandis: “Ĉu vi memoras la belaspektan vidvinon en la bieno, kie ni pasigis la nokton dum nia skisemajnfino en la nordo?”

“Jes, mi bone memoras,” diris Bob.

“Ĉu vi eble ellitiĝis en la mezo de la nokto, iris en ŝian domegon, kaj seksumis kun ŝi?”

“Jes diris Bob, iomete embarasita. “Tion mi konfesas.”

“Kaj ĉu vi uzis mian nomon anstataŭ vian propran?”

Bob ruĝiĝis kaj diris, “Jes, mi bedaŭras, sed jes, mi uzis vian nomon, kial vi demandas?”

“Ŝi mortis antaŭ nelonge, kaj mi here-dis ĉion, kion ŝi posedis.”

[El Tamen Plu] □

La elektita estraro de AEA por 2003

Prezidanto: S-ro Matthew Maguire
maguirem@optushome.com.au

Vicprezidanto: S-ino Jennifer Bishop
jenny.bishop@education.monash.edu.au

Vicprezidanto: S-ro Terry Manley
teren@ans.com.au

Sekretario: S-ro John (Ĝono) Gallagher
abcetc@ozemail.com.au

Vicsekretario: S-ino Hazel Green
hazgreen@twmba.net.au

Kasisto: S-ro Stephen Pitney
pitney@cybernetint.net

Vickasisto: S-ro Ken Rolls
kenjohnrolls@yahoo.com.au

Adresaro

Notu ke se iu volas ne publikigi sian adreson ktp en la adresaro, bonvolu tuj informi la sekretarion je abcetc@ozemail.com.au

Sukcesis en ekzamenoj

Baza Ekzameno:

S-ino **Saani Bennetts** (W.A.)
S-ro Jonathan Moylan (NSW)

Meza Ekzameno:

S-ro Erhard Claus (Qld)

La oceania komisiono

Raportas Bradley McDonald

En la pasinta jaro la komisiono pri-pensis ĝuste kion fari.

En kadro de “eksteraj rilatoj” oni esploris pri Darvino, sondadis por trovi homojn kiuj ekinteresiĝos pri Esperanto. Rezulte de minimuma reago

ĝuste pri Darvino, iom post iom kaj pli kaj pli enradikiĝis la ideo ke la landego Indonezio ege gravas.

Komprenoble la insuloj en Oceanio/Suda Pacifiko, kiel ekzemple Samoo, ankoraŭ devas resti en nia agadkampoj.

Por disvastigo de Esperanto en Indonezio eklaboris kelkaj aŭstralianoj: Penny Vos, Vera Payne, Mathew Maguire, inter aliaj, komencis prepari materialojn por parolantoj de la indonezia lingvo. Prilaborado de kurso por Interreto, lernolibreto, kaj hejmpaĝo okazis dum la plejparto de 2002.

La diskutlisto “Oceanio” ĉe Yahoo Groups daŭre rolis kiel forumo kaj punkto kie oni interŝanĝis helpopetojn, informon ktp.

Evidentiĝas ke aŭstralianoj ne vere havas bonan komprenon kiel aranĝiĝis la komisiono. Mankas bona kompreno pri la maniero en kiu ĝi funkcias. Ĝia konsistoj, mandato estas iom nebulaj.

Ĝi ja estas komisiono de UEA.

Inter ni tute evidentaj estas tiuj kiuj vidas valoron kaj meriton en la strebado. La celo enigi Esperanton en Oceanion kaj Indonezion certe apartenas al ni en tiu ĉi angulo de la mondo.

La afero eble pli bone funkciados se la estraro de AEA povos nomumi/elekti unu au du reprezentantojn al la komisiono. Indas ke same NZEA nomumu unu aŭ du reprezentantojn al la komisiono. Kvazaŭ AEA agnosku kaj oficialigu la apartan rolon ludatan de tia sendependa komisiono. Jen la ideo estas ke AEA starigu specialan fakon aŭ rubrikon por atenti “Oceanion”.

Iuj aliaj eventualaj landaj organizaĵoj estontece povos en simila maniero havi reprezentanton/ojn en la komisiono.

Esperable en la jaro 2003 ni ĉiuj ha-

vos pli klaran bildon (perspektivon) kiel subteni la laboron de la komisiono por Oceanio.

Okaze ke la komisiono elpensos/evoluigos planon por konkreta definitiva paŝon-post-paŝa agado en sia regiono, tiam la komisiono povos turni sin al AEA, NZEA, kaj aliaj organizaĵoj por praktika, morala, kaj financa subteno.

Infanaj desegnoj petitaj por granda ekspozicio

En 2004 la Esperanto-Centro de Angers (Francio), festos la centan datrevenon de la kreado de Esperanta grupo en la urbo. Je tiu okazo oni antaŭvidas diversajn manifestaciojn kaj interalie internacian ekspozicion de infanaj desegnoj, sub oficiala patronado, pri la ĝenerala temo de la “daŭra disvolviĝo” (protektado de la naturo, arbaroj, bestoj, lukto kontraŭ la polucio, lernejoj por ĉiuj infanoj, suna energio, pli sana agrikulturo, agado por havigo de pura akvo, protektado de la sano, ktp.).

La plej belaj desegnoj estos premittaj kaj por la lernejoj kolektivaj sendoj oni povos antaŭvidi interŝanĝon de desegnoj kun francaj lernantoj.

Estos tri kategorioj por partoprenantoj:

- ĝis 7-jaraĝaj,
- de 7- ĝis 10-jaraĝaj,
- de 10- ĝis 14-jaraĝaj.

La desegnoj estu senditaj al:

Esperanto-Centro, s-ro Frangeul, 6 rue de Buis, FR-49000 Angers, Francio.

Rete: bertrand-gilet@wanadoo.fr

[fonto: Ret-Info]

Persa-esperanta revuo en Irano

En la historio de Esperanto en Irano neniam aperis oficiale revuo en Esperanto. Meze de 2002, post 5-jara atendado, oni akiris la permeson de la Ministerio pri Kulturo, ke s-ino Fariba N. Maghd estu respondeca direktorino de la persa-esperanta revuo *Payam-e Sabzandishan* (“Mesaĝo de Verdpensuloj”). La 25-an de septembro jam aperis la 1-a numero de trimonata revuo *Sabzandishan* en du lingvoj (persa kaj Esperanto).

Adreso: P.O. Kesto 17765-184, Teheran, Irano

info@sabzandishan.com [El Eventoj]

Informado Raportas la Sekretario

La grupo kiu estas Ĝono, Debra kaj Stephen raportis en la Jarkunveno pri io tute nova: post ies morto oni anoncos tion en la loka gazeto por ke la publiko ĝenerala eksciĝu, ke Esperanto uzatas.

Bonvolu post ies morto enmeti noton en lokaj gazetoj aŭ eĉ informu la sekretarion por ke li povu aranĝi la jenan alineon:

(Name) — Esperantist. Respected friend to the world wide and Australian Esperanto community. (Name) will remain in our thoughts as one who contributed towards a better World through an abiding interest in the International Language Esperanto. □

Instruisto: Kio okazis al via hejmtasko? Lernanto: Mi faris el ĝi paperflugmaŝinon, kaj iu pirate ŝtelis ĝin.

[el Tamen Plu]

Raporto de la redaktoro:

ESK plu aperas akurate, sesfoje. Ni ĝuas la kontribuadon de artikoloj sendataj de pluraj el niaj membroj, inkluzive de novaj membroj kaj novaj verkantoj.

Ni ankoraŭ nur tre malregule ricevas raportojn de la diversaj federacioj, ligoj, kaj lokaj grupoj. Ili (escepte de la melburna grupo) regule sendas al mi siajn bultenojn, sed plejofte la bultenoj tro malfruas por akurata utiligo en *ESK*, tiel ke materialo en *ESK* ĉerpita el tiuj bultenoj estas plurajn monatojn malnova kiam *ESK* aperas.

Ni ankaŭ bezonas pli da materialo de niaj novzelandaj legantoj.

Responde al diversaj petoj, mi enkondukis novan rubrikon “For the Beginner”, kiu ŝajnas esti bone akceptata.

Aliflanke, en niaj plej lastaj konkursoj tre malmultaj legantoj partoprenis. Mi bonvenigus sugestojn pri pli popularaj konkursotemoj.

Ankaŭ: Fotoj estas ĉiam tre bonvenaj por *ESK*. Bedaŭrinde, malmultaj legantoj sendas al ni la originalojn de fotoj, tiel ke la kvalito de ilia reprodukto en *ESK* estas nesufiĉe alta; multe helpus se kontribuantoj sendus la originalajn negativojn de fotoj¹ (nia skanilo kapablas skani negativojn), por ke ilia reprodukto-kvalito estu pli bona.

¹ Resendotaj, kompreneblaj—

La recenzo pri NPIV

Noto de Marcel Leereveld

Pro spacomanko, la januaro-februara numero de *ESK* ne enhavas ĉiujn detalojn de mia originala recenzo. Mankas, i.a., kelkaj aliaj kritikoj, same kiel listoj de ekzemploj de malbonaĵoj.

Tiuj kiuj deziras legi la tutan originalon, ricevos ĝin post peto al: Marcel Leereveld, 12 Heather Grove, Belgrave South Vic 3160, Aŭstralio.

Danko de Jenny Bishop

Karaj Fratuloj de AEA,

Ĉe la Ĝenerala Jarkunveno en Melbourne, lundon la 13an de januaro, la Sekretario, Ĝono Gallagher, laŭtlegis la leteron al la Prezidanto de AEA skribitan en majo 2002 de Ralph Harry, en kiu li raportis la rekomendojn de la fratularo honori kelkajn membrojn. La membraro senescepte akceptis la rekomendojn.

Nun plej kore mi dankegas al vi la grandan honoron nombrigi inter vi, la plej eminentaj membroj de nia asocio. Tamen mi scias ke sen la granda helpo de mia edzo, Alan, mi neniam estus havinta la eblecon starigi sciencan projekton kiel EKPAROLI, nek la eblecon dediĉi tiom da tempo al la movado ĝenerale en Melbourne kaj kiel Prezidanto tra tuta Aŭstralio. Mi esperas ke mi povos daŭre labori por niaj noblaj celoj ĝis eventuala agnoskado de la registaraj Departementoj pri Edukado.

Novaj projektoj al kies realigo mi nun ŝatus helpi estas:

1. Celebrado de la Centjariĝo de Esperanto en Aŭstralio en 2005.

2. Kreado de aktivaj ligoj al la Esperanto-kluboĵoj en niaj ĝemelurboj, tiel ke eblos montri al niaj urbestroj ties efikon rilate al komunikado.

Kvankam pro la emeritiĝo de mia edzo kaj nia deziro pasigi pli da tempo ĉe niaj familianoj en Britujo mi agnoskas ke mi devas krei limojn, nepre sciu ke mi tute ne rezignos la defiojn diskonigi Esperanton tra nia tuta lando.

Salutas estime, Jennifer Bishop

National languages Conference: Languages for Life

Melbourne, la 27an kaj 28an de Oktobro, 2002.

Informas Jenny Bishop



Franciska Toubale kaj Marcel Leereveld
ĉe la Ekspozicio

Dum ambaŭ tagoj melburnaj instruistoj de Esperanto deĵoris ĉe bonaspekta ekspozicio pri Esperanto: ĝiaj historio, kulturo kaj valoro kiel komunikilo.

Sur la verda tabulo klare legeblis resumo de la historio de Esperanto, la valoroj de Esperantolernado kaj la strukturo de Esperanto, dum sur la tablo proponatis lernomaterialoj, in-

formiloj kaj libroj.

Interesatoj plejparte konsistis el denaske ne-anglaparolantaj instruistoj de lingvoj de malplimultoj. Ili aprezis la propedeŭtikan valoron de Esperanto kaj de ties multkultura aspekto, kio povos ŝirmi kontraŭ malapero de la malfortaj lingvoj de la mondo.

Esperable tiuj instruistoj havos ŝancon preparoli tiujn avantaĝojn al siaj denaske anglaparolantaj kolegoj kiuj ĝis nun ne alte taksas Esperanton.

Kvankam ne rekte vizitita de la plejmulto de ĉeestantaj instruistoj de lingvoj, certe valoris montri ke Esperanto ja bone vivas.

Esperable en julio eblos starigi budon ankaŭ ĉe la nacia kongreso en Brisbano, kaj poste ĉe la internacia kongreso de FIPLV (Fédération Internationale de Professeurs de Langues Vivantes) komence de julio, 2003 en Johannesburg, SudAfriko. □

Monda Turismo bankrotis

22 sep 2002 en Bydgoszcz (Pollando) Eksterordinara Ĝenerala Kunveno de Monda Turismo, konsiderinte la ekstre malfacilan financon situacion de MT, decidis turni sin al juĝejo kun formala peto verdikti bankroton de MT kaj dissolvi la Asocion kaj komenci likvid-procedon samtempe kun la juĝeja verdikto. Ĝis la juĝeja decido la asocion reprezentis W.D. Emler, R. Grzebowska kaj T.J. Kudrewicz. Plua kunlaborado de la eksaktivuloj de MT daŭros kadre de la amatora internacia klubo Esperantotur.

Informis Halina Gorecka en *NUN* [El *Ret-info*]

Nova Filmo

Novan filmon kun Esperanto-komentario eldonis EKO Publishing en Britio. Profesia filmisto de la Universitato de Liverpool faris la filmon pri varm-aera balonado — ekde la tero kaj en la aero — do la filmo enhavas tre vidindajn buntajn kaj viglajn bildojn. Malcolm Jones, konata Esperanto-instruisto en Britio, verkis kaj parolis la komenton. Per folieto de la teksto de la komentario, lernantoj kaj instruistoj povas uzi kaj ĝui la filmon. 19 min. PAL-sistemo. €23 inkl. sendokoston. (UEA konto: bbur-x). De: Brian Burnett (EKO), Nant Yr Hafod Cottage, Llandegla, WREXHAM LL11 3BG, Britio. [El *Ret-info*]



Interrete



• **Danke al la persista laboro de Jozefo Nemeth**, la revuo *Internacia Pedagogia Revuo*, IPR, havas rekonstruitan, novan kaj tre enhavriĉan retejon!

En la retejo vi povas trovi ne nur la enhavon de la lastaj numeroj, sed ankaŭ abundajn kunligitajn temojn; indkson de artikoloj kaj temoj de la lastaj 6 jaroj, abundajn informojn pri ILEI kaj *Juna Amiko*, ktp. ktp.

Indas la vizito ĉe:

<http://www.nl-papa.hu/ipr/>.

[L.S. el *Ret-info*.]

• **Ĝangalo.com estas nova retsitto** tut-esperanta, ĉe kiu eblas legi la plej novajn informojn mondajn kaj ankaŭ esperantomovadajn, diskuti, babiladi, elŭti interesaĵojn, legi dokumentojn, kc.kc. Krome, ankaŭ eblas trovi tie ŝercbildojn (bongustajn!), kaj ligojn al senpagaj literaturaĵoj. Ĝi estas bone prizorgata, kaj ĉiutage ĝisdatigata. Ni rekomendas viziton al ĝi.

Retadreso: www.gxangalo.com

[Trovita surbaze de informo de *Ret-info*.]

• **La retlegilo Mozilla**, kiu estas senpaga kaj por Windows kaj por Macintosh, tre bone vidigas la esperantajn literojn, kaj ĝia poŝtprogramo ankaŭ bone tapjas ilin.

Se vi jam uzas ĝin, aŭ se vi elŭtos ĝin, de www.mozilla.com, vi povos ankaŭ elŭti senpagan programeton kiu ŝanĝos la menutitolojn kc. de Mozilo en Esperantan, tiel ke vi havos preskaŭ tutesperantlingvan retlegilon. (Ankoraŭ estas kelkaj mankantaj menutitoloj, kiuj restas angla-lingvaj.) Tiun konvertilon vi povas elŭti ĉe:

www.esperanto.org.uy/mozilo/

• **Vi verŝajne scias ke la serĉilo Google** jam scias paroli esperante. Aktiviginte Google-n per via retlegilo, en “preferoj” vi povas elekti Esperanton kiel vian preferatan legolingvon. Tio signifas ke la Google-notoj kaj -informoj aperas en Esperanto, uzante unikodon.

Via redaktoro jam provis ambaŭ (la Mozilo-konvertilon kaj la esperantigitan Google-n; kaj rekomendas ilin al vi.

• **Ret-info** estas internacia esperanto-novaĵservo kiu ĉiutage sendas al vi la plej novajn informojn pri eventoj en la esperantista mondo. Kvankam la eldonaĵo *Eventoj* ne plu ekzistas, *Ret-info* plu daŭrigas ĝian informagadon per ĉi tiu servo. Jarabono kostas €19 (=proksimume Aŭ\$35). Por detaloj, turnu vin al:

www.eventoj.hu/ret-info.htm.

Pastro William (Bill) Douglas Harding (1917-2003).

La Christchurch Esperanto-Societo perdis tre respektitan membron pro la forpaso, 8a de januaro 2003, de Pastro Bill Harding 86-jaraĝa.

Li estis ano de nia grupo dum 1969 (kaj eble pli frue!). Bill Harding ankaŭ, poste, membris en NZEA kaj, ĝis 1986, UEA.

Dum la lastaj jaroj Bill havis sanproblemojn sed partoprenis niajn kunvenojn kiam li povis. Ni memoras ke li festis, kun ni, Zamehof-tagon je la 1a de decembro 2002.

Ni jam esprimis kondolencon al liaj edzino kaj familio.

Dave Dewar. Sekretario,
Christchurch Esperanto Society



Dezirata Korespondi



• Krystyna HAWLENA, Ul. cisowa 18, PL 30-229 Krakow, Pollando.

krinjo@poczta.fm

Knabino 16-jara, vigla, amanta la vivon, interesiĝanta pri filozofio, poezio, literaturo, lingvoj kaj esperantologio. Mi deziras korespondi kun divers-aĝuloj; kaj (eble) gastigi en mia domo, en Krakovo.

• Navin Lal SHRESTHA, GPO Box 11753, Kathmandu, Nepalo.

navin@yahoo.com

Miaj hobiaj estas instruado, bildkar-toj, komputilo, legado, vojaĝado.

• Martí GUERRERO I COTS (en Barcelono, Hispanio): Mi studas la impostan sistemon, kie la plejgranda parto de la enspezoj de la Administracioj devenas de la valoro de la tero, kaj ne de la salajroj nek la konsumo.

Mi legis ke en via lando funkciis tiu ĉi sistemo en Queensland, New South Wales, en Western Australia, en Tasmania kaj Victoria.

Mia intereso estas kontakti kun esperantistoj, kiuj konas tiun ĉi sistemon kaj povas informi al mi.

Dankon por via atento. Koran saluton: martige@yahoo.es

Mesaĝo de Jennifer Bishop

Karaj legantoj,

Esperantistoj plejparte ne estas riĉaj je mono sed ja riĉaj je helpemo al niaj meritaj samideanoj tutmondaj. Tiale mi esperas ke vi legos la ĉisuban peton de GBEGLO Koffi de UEA Oficejo en Togolando, Afriko, kaj je la fino, la proponon. Miaopinie, Afrika Agado vere ĉiamaniere meritas nian apogadon.

“Nun en Afriko la plejparto de Esperantistoj havas malpli ol 40 jarojn, kaj inter ili oni kalkulas nur kelkajn virinojn. Kiuj Esperantistoj havas pli ol 40 jarojn, inter tiuj ĉi preskaŭ ne estas virino. Pro la decido de TIETI-Instituto de Esperanto en Togolando (TIETo) esperantistigi malpli junajn homojn, unu virino, nomata TOSSOU Ablavi Marguerite, kun pli ol 52 jaroj, nun lernas Esperanton kaj perfekte uzas ĝin en korespondado. Ŝi eklernis antaŭ unu jaro, kaj diligente studas. Ni jam bezonas tiajn virinojn afrikajn

en nia movado. Ĉu ni ne uzu tiun ĉi virinon por logi aliajn al nia celo kaj porti la lingvon al alia tavolo pli supra de la socio en Togolando/Afriko?

Ŝi povas ege facile varbi aliajn. Sed necesas, ke nun ŝi estu entuziasma. Vere, partopreno en UK ege kontribuas en tia entuziasmiĝo. Sed nia granda problemo en Afriko estas manko de monrimedoj por partopreni la kongreson. Laŭ miaj kalkuloj, 2000 eŭroj sufiĉos por la vojaĝkostoj. Tiun ĉi monon ni trovu ie.

Mi tute ne petas de vi, ke vi disponigu la monon. Mi nur demandas, ĉu vi povas kampanji inter viaj konatoj, ke ni trovu tiun ĉi monon. Ĝi ebligos al la virino partopreni la kongreson en Svedujo, kie ŝi prelegos pri kondiĉoj de virinaj gravuloj en Afriko kaj pri aliaj temoj koncerne la afrikan vivon. Ŝi povos prelegi ankaŭ en aliaj landoj.

Se le vojaĝo estos okazinta, certas, ke ŝi, ree en Togolando, prelegos pri la

funkciado de Esperanto, kaj tiel povos logi aliajn virinojn al nia movado.

Ĉu vi povos ion fari? Se jes, diru tion al mi. Sed, se ne, vi rajtas ion ajn diri al mi, aŭ simple ne respondi. Vi tute kulpas pri nenio, kaj mi tutkore dankas vin pro tio, ke vi legis la mesaĝon.


Se vi volas rekte rilati kun la virino mem mi pretas doni al vi ŝiajn adresojn.

Ĉion bonan kaj koran dankon! Gk”.
Se vi emas helpi al TOSSOU Ablavi

Marguerite partopreni UK-n aŭ en Svedujo 2003 aŭ en Litovujo 2004, mi petas vin sendi mondonacon de iu ajn sumo aŭ al AEA ĉe Steve Pitney, Kasisto, aŭ al UEA-Konto por AFRIKA AGADO kun la speciala indiko “afrika virino al UK”.

Koran antaŭdankon,
Jennifer Bishop, vicprezidanto de AEA. □

Se iu havas la nomon kaj adreson de la filino de Ken Linton, Bonvolu sendi al Vera Payne, 36 Donegal Rd, Floreat WA 6014; aŭ per e-poŝto al:
vpayne@cygnus.uwa.edu.au.



El *Naturista vivo* 69 (2003-01-15)

Milita Floro Miksas la Simpatiajn Ŝnurojn

(strangegega titolo sed oni elektis vortojn hazarde el miksaĵo kaj la studentoj devis iel krei rakonton el tia strangegega titolo)

de Debra McCarney

en la kurso por kreema verkado gvidata de Daniel Kane.¹

Inter ĉiuj floroj en la bedo estis nur unu kiu ne volis vivi harmonie kun la aliaj. Antirino iam grumblis, koleriĝis kaj plendis pri siaj kunuloj.

“Vi, Rozo! Metu viajn dornojn aliloken! Vi pikas min.”

La komplezema rozo ruĝiĝis, provis teni siajn dornojn tiel ke ili ne plu eĉ proksimiĝis al Antirino, kaj ĵetis belan odoron en la aeron por trankviligi lin. Sed Antirino nur ternis kaj Rozo pli-ruĝiĝis.

“Helianto, stulta najbaro! Kial vi devas ĉiam alfronti la sunon? Kiam vi turnas vin posttagmeze, mi sentas min malvarma pro via ombro.”

Kaj la embarasita Helianto subenigis sian kapon pro honto.

Unu tagon la floroj decidis ke ili ne plu eltenu la konstantajn plendojn kaj kritikojn de Antirino. Kiam ili vidis ke li profunde dormas en la varmo de la posttagmeza sunbrilo, ili klinis sin unuj proksime al la aliaj kaj longa diskuto komenciĝis.

“Ni deprenu lin per la radikoj!” proponis Tulipo.

“Ni forigu lin al alia bedo!” sugestis Dalio.

Tamen vere, la floroj estis pacemaj kaj nur volis instrui Antirinin vivi trankvile kaj senprobleme inter ili.

Finfine Latiro parolis. “Vi ĉiuj scias ke mi kreskigas multajn volvrampaĵojn, ĉu ne? Kutime mi uzas ilin por grimpi cele al la suno kaj por subteni min sekure, sed se vi konsentas, mi proponos al Antirino, ke li uzu ilin por

ligi vin ĉiujn for de li. Mi metos miajn volvrampaĵojn, kiuj estas molaj, fleksiblaj — oni eĉ povas diri simpatiaj — je lia dispono, kiel ŝnuroj.”

La aliaj floroj aplaudis kaj ekscitite aprobis la proponon de la bela multkolora Latiro.

Kompreneble la feliĉa bruo vekis Antirinin, kiu snufegis kaj laŭte demandis, “Kion vi faras? Kial vi ĝenas min per tia bruaĉo?”

La floroj silentis dum Latiro klarigis sian proponon al Antirino.

